# LEA/G MAGAZINO

**Informilo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj**
**(Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete)**
**Membro de la LEA-Komitato de S.A.T. (Paris)**
**Inkluzivas la organon de Aŭstria Soc.Ligo Esperantista (ASLE)** ***La Socialisto***

***Esperanto, lingvo internacia – weltweit***

**Eldono/Ausgabe Nro.: 36** ☆ **Jarkvarono/Quartal: 1/2002**

## S A T - Sennacieca Asocio Tutmonda

***Kio estas S A T ?***

**Unika pro siaj celoj kaj strukturo, sia sistemo de funkciado kaj de komunikado, S A T alportas konkretan kaj praktikan respondon al ideo kiun esprimis la franca verkisto Henri Barbusse pri Esperanto**

***„Sincera dialogo inter du sinceraj homoj oficiale malamikoj ĉar ili apartenas al du malsamaj nacioj fatale evidentigas la tutan socian mensogon. Tiel modesta ĝi aspektas, meze de la disvolvado de grandaj ideoj de frateco kaj de racio, la kontribuo de la internacia lingo havas nekompareblan senperan kaj praktikan valoron.“***

**Tio klarigas kial S A T neniam havis la favoron de reĝimoj kies regprincipo baziĝas sur mensogo.**

***S A T celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn, kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.***

**>Ekstrakto el la S A T – statuto<**

***Kial S A T ?***

**Fondita en Prago en la jaro 1921, S A T naskiĝis en epoko kiam multaj sociaj kaj politikaj realaĵoj aperis sub vera lumo al la loĝantaro de la diversaj nacioj enmiksitaj en la unua mondmilito.**

**Malgraŭ tio la historio de la totalismaj, naciistaj, ideologiaj kaj religiaj devojiĝoj ne haltis. La ekzistokialo de S A T aperas en sia tuta evidenteco dum la aktualajoj ebligas malkovri kien la mensmanipulado de amasoj kaj diversaj formoj de mensogo kondukas la homaron.**

**La mensogo havas tiom pli da efiko ke la kultura kaj kritika nivelo de la loĝantaro estas malalta.** ***(Daŭrigo paĝo 2)***

*(Daŭrigo – Kial S A T ?)*

La vivkondiĉoj kaj la ĉirkaŭa medio homa kaj ekologia estas por granda parto el la homaro tute malfavoraj al disvolviĝo de la personeco, al riveliĝo de la homaj kapabloj kaj eĉ al normala afekcia kaj fiziologia disvolviĝo.

Ekzistas la sciencaj kaj teknikaj rimedoj, la riĉofontoj kaj produktaĵoj per kiuj estus eble alporti rimedon al multego da problemoj kaj certigi decan vivon al la tuta tera loĝantaro. Sed, ilia devojigo por egoistaj celoj estigas konstantan konfliktan klimaton.

La forigo de la minacoj kiuj pezas sur la estonteco de la homaro postulas antaŭ ĉio kreskantan strebon por konsciiga edukado sen kiu la totalitarismaj ideologioj kun efika mortiga, detrua kaj ruiniga sed sen konstrua, organiza kaj vivodona kapablo trovos ĉiam fekundan terenon.

***Kion faras S A T ?***

***Sennacieca,*** laŭ sistemo de funkciado, S A T dekomence adoptis ankaŭ sennaciecan, unikan laborlingvon, kies valoron agnoskis eminentuloj kaj internaciaj organizoj: Esperanto. Ĉi tiu lingvo proponas mondskalan ligilon per kiu povas naskiĝi kaj disvolviĝi tutplaneda konscienco kaj sento de aparteno al tiu kompleksa homa mozaiko kies ĉiu aparta ero estas respektenda kaj harmonie valorigenda: la homaro.



*Je bazo de la paragrafo de la ordono de la Ŝtatprezidanto por Defendo de la Popolo kaj Ŝtato de la 28 de februaro 1933 (RGBl I S 83) per tio ĉi „der Nation-Losen-Weltbund der Esperantisten“ (Sennacieca Asocio Tutmonda. Sidejo: Parizo XX) estas malpermesita.*
(Sekvas ordono de konfisko de la havajo)
*Lajpcigo (Leipzig), 12.5.1934*
*La policprezidantaro/Knofe*

S A T celas praktikan mondskalan uzon de Esperanto por celoj de socia progreso kaj emancipado de la laboristaro.

Ĉar ĝiaj membroj aktivas ankaŭ en plej diversaj movadoj, S A T estas tiel la krucvojo kaj ligilo inter diverslandaj organizoj kies celoj estas similaj, komplementaj aŭ proksimaj sur la terenoj de edukado, sindikatismo, ekologio, libereco, homa interhelpo, pacdefendo, ktp, sed kies lingvo estas malsama.

La rolo de S A T en la sukceso de Esperanto kompare al aliaj provoj vivigi projektojn de planlingvoj estas eksterduba. Sen tiu ĉi strebo celanta havigi socian

*(Daŭrigo – paĝo 3)*



kulturan kaj praktikan dimension inter la partoprenantoj de la ĉiutaga socia vivo, Esperanto estus spertinta saman sorton.

***Servoj kaj membreco en S A T***

Ĉiu S A T – membro ricevas ĉiun duan jaron la adresaron de la asociaj membroj, kio ebligas havi rilatojn, interŝanĝojn, kontaktojn kaj prepari projektojn kaj vojaĝojn kun aliaj membroj kies interesoj, aktivado kaj gustoj kongruas.

Kun membraro en pli ol 40 landoj de la kvin mondpartoj, SAT havas krome du servojn kun esence socikultura intereso: la <SAT-broŝurservo> por eldonado de broŝuroj kun tre varia enhavo, kaj la vojaĝservo <Amikeca Reto>

S A T eldonas du periodaĵojn: SENNACIULO, ĝi aperas dekunu fojojn jare kun kontribuaĵoj verkitaj de membroj, kaj, la socikultura SENNACIECA REVUO, unu fojo jare kun artikoloj verkitaj de esperantistoj ne nur el S A T-movado kaj aparte kompetentaj rilate al Esperanto kaj al sia fako.

Inter la plej gravaj kontribuaĵoj al disvastigo de Esperanto S A T eldonis: la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV). Ĝi estas la plej kompleta Esp-vortaro kaj la sola tutmonde referenca.

**Membreco/Abono** *(por germanoj)*

Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon (inkl.liverado de la asocia organo,Sennacieca Revuo, k. adresaro) = 49 Euro; malriĉaj emeritoj, senlaboruloj kaj junuloj ĝis 25j. = 24,50 Euro (samajn rajtojn k. servojn) samfamilianoj = 24,50 Euro (sed ne ricevas la organon, adresaron k. Sennaciecan Revuon);
nura abono de la asocia organo *SENNACIULO* = 54,- Euro.

*Aliĝilo/abonilo k. informoj havebla) ĉe:*

*Jiri PROSKOVEC*
*Heimbaustr.10 44143 Dortmund*
*Reto: >proskovec@mac.com<*

*(kaj)*

*Albert F. STEPHAN*
*Renchener Str.47*
*77704 Oberkirch (Baden)*

*Kto. LEA/G k. SAT en Germanio:*
*Proskovec, Jiri, Dortmund*
*Nr. 9168-434*
*Postbank Essen (BLZ 360 100 43)*

*Adreso de S A T en Parizo:*
*S A T, 67, avenue Gambetta*
*FR-75020 Paris*
*Tel: +(33-1)47 97 87 05*
*Telekopio: +(33-1)47 97 71 90*
*Ret': satesper@noos.fr.*
*TTTpaĝoj:http://www.multimania.com/satesperanto*

---

*Al la partoprenantoj de la 43-a mondkongreso de la laboristaj esperantistoj mi sendas miajn korajn salutojn. Mi ĝojas, ke tiu ĉi kongreso en Augsburgo kunigas multnombrajn gastojn el Eŭropo kaj ekstereŭropaj landoj. La celo de la paca interkompreniĝo trans mondkoncepton kaj limojn meritas la subtenon de ĉiuj spiritaj kaj politikaj fortoj.*
Telegramo de la germana kanceliero
Willy BRANDT ( kongreso 25-31.06.1970)

---

Fakaj kaj servoj de S A T

Solidarservo: SAT (Parizo)
Poŝtkonto: SAT 1234 22 K Paris

Broŝurservo: Amika Esperanto-Rondo, Cargue Sac,
FR-47470 Beauville
Poŝtkonto: Cercle Amical Espérantiste 3 371 74 M Bordeaux

Amikeca Reto: G.Rollin
88 rue Victor Hugo
FR-37400 Amboise
Poŝtkonto: Amikeca Reto
36 64 74 G La Source

Filatela Servo:
Modesto Ramelli
11, impasse du Moulin Neuf
FR-57160 Chatel-Saint-Germain

Junulfako:
V. Markov, 61 bd. Vauban
FR-78 180 Montigny – le – Bretonneux
Poŝtkonto: SAT-Junulfako
nro. 38.319 09 J. La Source
*Organo: La Juna Penso*

---

Verbunden mit SAT, Landesgruppen u.a. z.B. in Frankreich, England, den USA, Brasilien, Osteuropa, China, Japan.
In Deutschland ist aktiv:
*Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete*
*Sitz: Renchener Str.47*
*77704 Oberkirch (Baden)*

---



Eldonoj de S A T i.a.


Sennaciulo
BALOTOJ EN BOSNIO KAJ HERCEGOVINO




Inter la plej gravaj kontribuaĵoj de S A T al la disvastigo de la lingvo internacia la PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO !

*Ĝisdatigu vian adresaron*

*1: Adresŝanĝoj*
***Holger RABE, Gerichtshausstr.14***
***CH-8750 Glarus***
*2: Aliĝis k. abonis la informilon*
***Ass. Thomas HEBERLEIN***
***Kuckuck 3, 31789 Hameln***

***Yvonne SCHWINARSKI***
***Eselsweg 18 B, 99441 Kromsdorf***

***André VAATZ, Geibelstr.51***
***22303 Hamburg***

***Manfred WESTERMAYER***
***Kandelstr.12, 79194 Gundelfingen***

*(MAGAZINO 36 – paĝ0 22)*

*3: Eksiĝis resp. poŝta sendaĵo revenis sen nova adreso*

***Hermann SCHEFFLER***
***Oberhausen***

***Tomislav MITROVIC, Niŝ***

***Friedrich MEYER, Herpf***

***Siegfried LINKE, Halle***

***Albert SCHUBERT, Kamen***

***Prof. Kurd ALSLEBEN, Hamburg***

***LEA/G serĉas inter la membroj aktivulojn, kiuj estas pretaj transpreni honor-ofican funkcion en la asocio ek de la venonta elektperiodo.***
***Interret-adreso estas avantaĝa!***
***ĈU VIN INTERESAS!***
***Kontakti per letero kun:***
***A.F.Stephan, Renchener Str.47***
***(DE)-77704 Oberkirch (Baden)***

## Fritz-Hüser-Gesellschaft

**Diese Fördergesellschaft für das Fritz-Hüser-Institut in Dortmund wurde 1988 gegründet und hat sich die Aufgabe gestellt, die Arbeit des Instituts zu unterstützen.**
**Bekanntlich ist es europaweit die einzige Einrichtung, in der deutsche und ausländische, auch Esperanto-, Literatur gesammelt und erforscht werden.**
**Beide, Institut und Fördergesellschaft, tragen den Namen des Stahlarbeiters, Bibliothekars und unermüdlichen Privatsammlers Fritz Hüser.**
**Spenden und die Übergabe von Nachlässen tragen zur Förderung der Ziele der Gesellschaft bei. Mitglieder sind stets willkommen.**
**Auskunft bei: DGB-Kreis Hochsauerland**
**E. Söder, Löckestr.14a, 59821 Arnsberg**
**und auch beim Gesellschaftsmitglied**
**A.Stephan (Anschrift s. Impressum)**

---

**Edyta MAJCHRZAK (16j)**
**Ul.Wawelska 23/17**
**PL-44-217 Rybnik (Pollando)**
**deziras korespondi kun geamikoj en Germanio.**
**Edyta interesas pri muziko, sporto kaj modo.**

---

***Ni ricevis n°6 de TREFO, bulteno de TRENHA pri nova help-alfabeto***
***Redaktoro André Albault***
***21, rue de Verfeil, FR-31200 Tuluz***
***pritraktas sur 12 paĝoj la eblecon skribi alie la Ersperanto-alfabeton. Ekz.anstataû supersignojn ^ li uzas –h. Kion vi, karaj gelegantoj, opinias pri tio?***

## Esperanto kaj ideologio

Jen la titolo de simpozio, kiu okazis la 20an de oktobro 2001 en Gent (Flandrio), en Lakenhalle. La simpozion organizis la Genta-Esperanto-Grupo kun helpo de Jakvo Schram el Antverpeno.

Pluraj altranguloj kaj famuloj el la Esperantomovado prelegis. Detlev Blanke skizis la laboristan Esperantomovadon antaû kaj post la du mondmilitoj kaj akcentis ke Esperanto estas uzita jam por kiu ajn ideologio. Ĝi estas nur rimedo.

Francois Degoul parolis pri ideologiaj eldiroj en la verkoj de Zamenhof (tamen nur tre ĝeneralaj) kaj Alberto Fernandez parolis pri siaj spertoj en la socialisma movado konvinki homojn pri la utilo de Esperanto. Renato Corsetti (prez.o de UEA kaj de itala laborista E-asocio) analizis pri „por tio mi ne kreis Esperanton" kaj iom tuŝis la nuntempon en kiu Esperantistoj laû li estas ‚Judoj en la dezerto'.

La paroladoj estis ĝenerale bone preparitaj, la vortoj kelkfoje perdiĝis en la bruoj de skermantoj kaj infanoj kurantaj sur la unua etaĝo super la ejo. Fine de la tago okazis debato en kiu kiel kutime kelkaj homoj starigis bonajn demandojn kaj aliaj atencis la pasciencon de la ĉeestantoj per longaj paroladoj sen klara demando aû kritika punkto.

Mia ĝenerala impreso estis ke multaj Esperantistoj interesiĝas pri la temo kaj tial estas ĝojige, ke „La Progreso" iniciatis tiun simpozion. Mia kritiko estas nur ke ĝenerale oni tro multe emas historiumi kaj tro malmulte pripensas la nuntempon. La situacio ke „granduloj" en la socialisma movado havu pozitivan opinion pri Esperanto pro ke la partianoj ĝin lernu (kiel rakontis Fernandez) estas jam pasinteco delonge. Nur Corsetti kuraĝis iom fronti la nuntempon. Li estis ankaû plej klara pri la siaopinie ekzistanta ligo inter Esperanto kaj ideologio de defendo de diverseco de lingvoj kaj kulturoj. Sed Detlev Blanke kontraûis ke „ni ja montru la valorojn por kiuj ni Esperantistoj batalas", ĉar Esperanto estas nur lingvo kaj nenio pli.

Mi mem opinias ke la plej grava nuntempa argumento por Esperanto kiel interlingvo ĝuste troviĝas en tiu ideologia b azo de respekto al kultura kaj lingva diversecoj. Mi ne plu kredas en la „objektiveco" de faktoj, ĉar kiel post-modernulo mi scias ke faktoj estas rigardataj tra valorkovritaj okuloj.

Estus bone se post tiu unua simpozio estos organizita alia kiu havus kiel ĉeftemon la rilatoj inter Esperanto kaj nuntempaj ideologioj kiel tutmondiĝo kaj kontraûtutmondiĝo individuismo kaj konsumantismo, fundamentismo kaj liberalismo. – Tiam oni povos pli celtrafe argumenti en la nuntempo por Esperanto. Do: gratulon al la organizintoj kaj ni esperu ke sekvos simpozio pri la menc.temo

Bert de Wit



## ‚Grüne', die Esperanto sprechen
## Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)

AVE ist eine kleine globale Gruppe von Leuten, die Esperanto sprechen und Mitglied einer *grünen* Partei sind; sie machen ökologische, soziale, pazifistische und menschen- und tierrechtsbezogene Arbeit.

Wir denken global und handeln lokal bzw. regional. Wir haben neben der grünen Politik zwei gemeinsame Ziele: 1. Information über Esperanto bei den Grünen Parteien, besonders in den kontinentalen Föderationen. 2. Die Information über Grüne Politik bei den Esperantisten.

AVE hat etwa 300 Mitglieder und viele Interessenten, davon etwa 1/4 weiblich. ¾ wohnen in Europa (Ost- und West-), folgt Amerika, Australien, Asien und Afrika. Etwa 1/5 ist per E-mail zu erreichen.

Esperanto ist die Sprache für die Grünen,

weil sie speziell geschaffen wurde, um Frieden durch internationale Verständigung zu erreichen;

weil durch Esperanto die Vielfalt der regionalen Sprachen bestehen bleibt und diese vor der Übermacht der imperialistischen (hegemonialistischen) Sprachen schützt;

weil wir Grünen bei unseren internationalen Zusammenkünften Sprachdiskriminierung nur vermeiden können, wenn wir untereinander die neutrale Sprache Esperanto gebrauchen.

*(Fortsetzung – Seite 8)*

AVE estas malgranda tutmonda grupo de homoj, kiuj parolas Esperanton kaj estasmembro ĉe iu verda partio resp. faras ekologian, socialan, pacifisman laboron kaj laboron, kiu rilatas al homaj resp. bestaj rajtoj. Ni pensas terglobe kaj agadas loke k. regione. Ni havas krom la verda politiko du komunajn celojn:

1. informadon pri Esperanto ĉe la verdaj partioj tute aparte en la kontinentaj federacioj;
2. informadon pri verda politiko ĉe la esperantistoj.

Ni varbas per bonaj vortoj kaj papero *(AVENO, VERDire,* fundamentaj tekstoj en Esperanto pri verda politiko).

AVE havas proksimume 300 membrojn kaj multajn interesitojn el kiuj ĉ. 1/4 estas inaj. ¾ loĝas en Eûropo (orienta kaj okcidenta), sekvas Ameriko, Aûstralio, Azio kaj Afriko. Ĉ. 1/5 estas atingeblaj retpoŝte.

Esperanto devus iĝi la dua lingvo por ĉiuj; tio neniel ekskludas la okupiĝon pri aliaj lingvoj.

Esperanto estas la lingvo por la verduloj,

ĉar la lingvo Esperanto estis speciale kreita por atingi pacon per internacia interkompreniĝo;

ĉar per Esperanto la diverseco de regionaj lingvoj restas, kaj tiuj protektiĝas kompare al la superforteco de imperiismaj (hegemoniismaj) lingvoj. *(Daûrigo – paĝo 8)*

(Fortsetzung von Seite 7)

DARUM ist Esperanto auch DIE internationale Sprache für Eûropa:

Für die EU und das EP (Europa-Parlament) stellen wir uns, spätestens nach der Aufnahme der nächsten Beitrittskandidaten, vor, dass vier nationale und eine neutrale Arbeitssprache verwendet werden. Das Prinzip der sprachlichen Gleichberechtigung ist schon heute nicht mehr durchgängig *gegeben.* Als neutrale Sprache, welche die nicht (mehr) im EP simultan übersetzten Sprachen vertreten soll, wäre nach unserer Meinung Esperanto bestens geeignet. Sie ist neutral und leicht erlernbar.

*Unsere Home-page (z.T. in deutsch, englisch u. französisch)*
*http://www.comlink.apc.org/ave/welcome.htm*

*Manfred Westermayer*
*Kandelstr.62*
*79194 Gundelfingen*
*(AVE-Sekretär)*

(Daûrigo de paĝo 7)

ĉar ni verduloj ĉe niaj internaciaj renkontiĝoj nur tiam povas eviti lingvan diskriminacion, se ni inter ni uzas la neûtralan lingvon Esperanto!

Tial Esperanto estas ankaû la internacia lingvo por Eûropo:

Por la EU resp. la EP ni imagas, ke plej malfrue post la akcepto de la venontaj aliĝkandidatoj kvar naciaj kaj unu neûtrala laborlingvoj estos uzataj. La principo de lingva samrajtigo estas jam hodiaû ne plu ĉiuloke respektata. Kiel neûtrala lingvo, kiu reprezentu la ne (plu) en la EP simultane interpretatajn lingvojn, Esperanto estus niaopinie plej-eble adekvata; ĝi estas neûtrala kaj tiel facile lernebla kiel lingvo entute povas esti.

Manfred Westermayer
LEA/G-aktivulo

Nia hejmpaĝo: (parte en germana, angla kaj franca lingvoj):
http//www.comlink.apc.org/ave/welcome.htm

---

SATEB –
Sennacieca Asocio enBritio
Semajnfino k. Jarkunveno
17-a – 19-a Majo 2002

INFOj havebla ĉe
Anne Johnson
42 Beresford Rd. Islington
London N5 2HZ
Gastpreleganto: SAT-Konsilanto
Jakvo Schram (el Belgio)



LEA/G kore gratulas...

k-don Helmut Breuninger, Ulm, kiu fariĝis naûdek jaroj.

---

Siegfried Ziegler 1902 – 1984

kompetenta fondinto de la Germana Esperanto-Asocio postlasis grandan stokon de esperantaĵoj, E-libroj, -gazetoj, kiujn arkivis la Fritz-Hüser-Institut en Dortmund.

## Deklaration des 74. Kongresses der Arbeiter-Esperanto-Bewegung

Der 74. Kongress fand vom 14. - 20. Juli 2001 in Nagykanizsa/Ungarn statt. Die 176 Teilnehmer aus 27 Ländern der fünf Kontinente stellten fest, dass in der heutigen Welt mehr und mehr freiheitlicher globaler Liberalismus von großen kapitalistischen Unternehmen erzwungen wird. Dieser Globalismus vergrössert den Abstand zwischen reichen und armen Schichten der Weltbevölkerung, gleich ob in reichen oder armen Ländern.

Die globale Wirtschaft ermuntert zur Ausbeutung und Versklavung von Kindern und Frauen.

Sie belastet weniger reiche Länder mit Schulden, so daß deren ökonomische und gesellschaftliche Entwicklung behindert wird.

Der Kongress unterstützt Bemühungen und Unternehmungen gegen den neuen Liberalismus und den harten Kapitalismus.

Der Kongress verurteilt die Politik jener europäischen Regierungen, welche einen neuen eisernen Vorhang zwischen dem, westlichen und dem östlichen Europa sowie den *Ländern* der sogenannten Dritten Welt errichten, indem sie den Visumzwang und Begrenzungen von gegenseitigen Besuchen der Bürger aus verschiedenen Ländern einführen.

Der Kongress verurteilt die Todesstrafe, die noch in vielen Ländern angewendet wird.

Der Kongress verurteilt jedwede Unterdrückung in ethnischer Hinsicht und auch jede Art von Nationalismus.

Der Kongress verurteilt pseudo-demokratische Regime und deren Unternehmungen gegen die Arbeiterschaft sowie zur Abschaffung des 1.Mai-Festtages.

Der Kongress unterstützt weltweit alle Organisationen, welche gewaltfrei gegen nicht demokratisch gewählte Gruppen auftreten (Weltbank, Internationaler Währungsfonds usw.). Der Kongress verurteilt das Bestreben, unsere Welt zugunsten des Profits einiger reicher Schichten in jeder Nation zu regieren.

*(Übersetzt v. A.F.Stephan, grammat.kontrolliert v. Hans Rodewig)*

## Mia penso

Sur la kampo, for de l' mondo,
antaû nokto de somero,
amikino en la rondo
kantas kanton pri l' espero
kaj pri vivo detruita
ŝi rakontas kompatante, -
mia vundo refrapita
min doloras resangante.

„Ĉu vi dormas, ho, sinjoro,
kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro
el la kara infaneco?"
Kion diri? Ne ploranta
povas esti parolado
kun fraûlino ripozanta
post somera promenado!

Mia penso kaj turmento
kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
al vi iris jam oferoj!
Kiun havis mi plej karon
la junecon – mi ploranta
metis mem sur la altaron
de la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,
vivi ankaû mi deziras ...
Io pelas min eterne,
se mi al gajuloj iras ...
Se ne plaĉos al la sorto
mia peno kaj laboro ...
Venu tuj al mi la morto,
en espero ... sen doloro.

Verkita de L.L.Zamenhof
(1759 – 1917)

Germanigo fare de
Manfredo Ratislavo
(en 01/1997 k. 09/ 2000)

## Meine Gedanken

Auf dem Lande, vor dem Städtchen,
sommerabends in der Rund,
von der Hoffnung singt das Mädchen
und es klingt aus ihrem Munde
wie aus fernen Kindertagen.
Und sie singt so traur'ge Lieder;
so als wär sie aufgeschlagen,
blutet meine Wunde wieder.

„Warum bist du so verschwiegen,
lieber Freund?" hör ich sie fragen.
„Ist's Erinn'rung?" Sollt' ich lügen?
Ach, ich kann es dir nicht sagen!
Weinen müßt' ich, wenn ich's sagte.
Wozu sollt' ich sie betrüben?
Und was nützt es, wenn ich klagte?
Wär' ich doch nur fern geblieben!

All mein Denken und die Fülle
meines Hoffens, meiner Schmerzen –
wieviel in der Kammer Stille
opfert' ich von ganzem Herzen!
Ach, das Teuerste im Leben
gab ich hin, es war mein Sehnen,
meine Jugend, all mein Streben,
weil ich's mußte – unter Tränen!

Feuer fühl' ich in mir brennen,
Etwas treibt mich immer weiter...
Und doch möcht' ich leben können,
wie die andern, froh und heiter ...
Wenn Erfolg mir nicht beschieden,
dann möcht' ich nicht weiter leiden,
möcht' nicht bleiben mehr hienieden
Hoffnungsvoll von binnen scheiden.

Frei ins Deutsche übersetzt von
Manfred Retzlaff am 21.01.1997 nach
dem Originaltext von L.L.Zamenhof
(die vierte Strophe am 21.09.2000)



## Potjomkinaj vilaĝoj

La esprimo „Potjomkinaj vilaĝoj" devenas el la rusa historio. Dum la vojaĝo de la rusa carino Katharina al la duoninsulo Krim en la jaro 1787 la princo Potjomkin konstruigis – laûdire – laûlonge de la riverego Wolga, kiu estis la vojaĝvojo de la carino, fiktivajn sed belajn vilaĝojn por elmontradi, ke en Ruslando ekzistas bonstato. Mia demando: Ĉu hodiaû ne ankaû ekzistas potjom-kinaj vilaĝoj?

Eble ili ne estas fiktivaj, sed vere belaj vilaĝoj. Vojaĝu al afrikaj, aziaj aû mez-amerikaj landoj kaj supozeble vi loĝos en unu de tiaj vilaĝoj. Estas tielnomataj „klub-vilaĝoj" kie ferii la vojaĝentreprenoj ofertas. Ili aranĝas specialajn ripozejojn nur por eûropaj ferivojaĝantoj. En klub-vilaĝo oni povas aĉeti ĉion; la manĝadojn en la klub-restoracio estas bona.

Ekzistas lokoj, kie ĉarmaj junaj homoj zorgas, ke la turisto ne enuas. Enlandanoj, kiuj ne havas laboron en klub-vilaĝo, ne rajtas viziti la aranĝon.

La feriogastoj ofte restas la tutan restadon nur en la feriejo kaj ne vidas la povrajn loĝantojn. Por rigardi la belezon de la ĉirkaûaĵon la turismaj oficejoj organizas ekskursojn al vidindaĵojn: muzeoj kaj luksaj restoracioj. Do, la feriogastoj rigardas la realan situacion nur tra la fenestroj de la buso.

La enloĝantoj de la landoj, kie la eûropano intencas ripozi, estas multofte ege malriĉaj. Diktatoroj, kiuj regas landon, ne konsideras la homajn rajtojn. Malsato, malriĉeco, malsano estas normalaj.

Ekz. la dungitoj en afrikaj landoj aû sur la karibaj insuloj kiuj priservas la turistojn, estas salajrataj preskaû dekoble malpli ol simplaj turistoj salajrojn ricevas en siaj propraj landoj. La plej multaj feriantoj fermas la okulojn pri la situacio, sed ne hezitas plendi pri realaj aû ne veraj malagrablaĵojn.

Tiu turismo kaûzas ankaû sociajn problemojn, kiuj antaûe ne ekzistis. Temas pri prostituado akompanata per uzado de drogoj kaj eblan infekton per aidoso. Ekz. en Thailando: Multaj veturas al tiu bela lando por sekskuniĝi kun junaj knabinoj kaj eĉ knaboj. Tiuj junuloj loĝas en primitivaj domaĉoj kaj eble devas ,labori' por iu mafioso.

La indigenoj havas ja ekonomiajn problemojn. Pro tio ĉiu ebleco ricevi monon estas bonvena; la junaj familianoj do ,laboras' per siaj korpoj en la grandaj urboj. Por religiaj fanatikuloj tio estas bonvenaj okazaĵoj brulmarki la turistojn esti diabloj. Por malriĉaj landoj, regataj de diktatoroj, la turismo estas granda negoco alportante financojn. Ĉu per tiu mono la diktatoro subtenas la popolon aû ĉu li uza ĝin por aĉeti novan luksan aviadilon per kiu, li estas certa, lia haremo estos plej bone transportata?

K.H.Kersting

# La Socialisto

## Ĉu Aŭstrio bezonas novan laboristan partion?

**de Reinhold Kammler**

Bona demando. Unue ni klarigu, kio estas 'laboristo'. Laŭ mia opinio, laboristo estas ĉiu homo, kiu sin vivtenas per vendado de sia laborforto kaj ne havas la povon decidi pri ĝia apliko. Do, manaĝero, kvankam laŭleĝe salajrulo, kiu rajtas decidi pri la mono kaj homoj de la firmao, tutcerte ne estas laboristo. Aliflanke, kuracisto en hospitalo, kiu, post pena dumnokta deĵoro ne devas riski eraron eble mortkaŭzan por siaj pacientoj, sendube estas laboristo, malgraŭ sia doktora titolo.

Sed, kiun sencon havas la demando? Ĉu ne ekzistas unu aŭ pluraj partioj en Aŭstrio, kiu(j) pretendas agi por laboristoj? Kelkaj homoj asertas ke ne, kaj ili tion eĉ skribas tion en legantleteroj al gazetoj. Ili emfazas, ke la nunaj aŭstriaj partioj ne (plu) zorgas por la bezonoj de la laboristoj kaj sekve necesas fondi novan laboristan partion. Tiu, iom stranga, afero bezonas kelkan klarigadon.

Inter la mondmilitoj ekzistis du partioj, kiuj sin definis laboristaj partioj: la komunista kaj la socialdemokrata partio. Ekskluzive la dua ludis gravan rolon en la politiko de Aŭstrio, precipe de la urbo Vieno. La 'ruĝa Vieno' kontrastis kaj konkuris kun la 'nigra' resto de Aŭstrio, kiun regis plejparte la burĝa kristandemokrata partio. Tiam preskaŭ ĉiuj homoj sciis, kiu partio ilin reprezentas aŭ almenaŭ batalas por ili. La unua krizo de tiu sistemo okazis, kiam tiuj partioj ne tuj havis respondon je la problemoj de la mondvasta ekonoma krizo kaj la senlaboreco kaŭzita de ĝi. Tiam la naziuloj prezentis simplan respondon, la sekvo estas konata.

Post la dua mondmilito ĉio estis detruita, sed tamen en ordo. Ĉiu homo sciis, kion fari: rekonstrui la landon kaj la socion. La partioj denove havis la fidon de la popolo, des pli, ke ili dum iom da tempo kondutis pli prudente ol antaŭ la milito. La ideologiaj diferencoj ekzistis, sed unue rangis la granda celo de la rekonstruo. Sed iom post iom pliboniĝis la situacio kaj komplikiĝis la mondo. Naskiĝis nova generacio, estiĝis novaj teknologioj, kiuj ŝanĝis la mondon de la laboristoj. Multaj el la reguloj, laŭ kiuj pli fruaj generacioj destinis ilian vivon, perdis sian sencon. Tiam Fred Sinowatz (Sinovac), kanceliero de Aŭstrio, de la intertempa 'socialista Partio' eldiris publike signifan vorton: "Ĉio estas tre komplika."

Sinowatz estis saĝa viro kaj tute pravis, sed ne prudenta. La homoj sciis, ke ilia mondo pli kaj pli komplikiĝis. Tion ili ne volis aŭdi. Ili volis, ke la



politikistoj donu al ili solvojn por la ĉiam pli komplika vivo. Plejeble simplajn solvojn. La homoj devus pripensi, ke la politikistoj estas parto de la popolo kaj ne povas esti pli saĝa ol ĝi, sed tio kondukus al malespero. Prefere oni serĉas kulpulojn kaj atendas je konvenaj respondoj. Kaj ili venis.

Kvazaŭ fungo el arbara grundo kreskis en Karintio homo kun la nomo Jörg Haider. Grandbienulo, intelektulo. Sed la laboristoj taksis lin unu el ili, ĉar li imitis ilian parolmanieron, ĉar li publike diris, kion ili kuraĝis nur grumbli kaŝe aŭ diri trinkinte multe da biero. Li asertas, ke kulpa je ilia situacio estas nur la eksterlandanoj (do turkoj, rumanoj, poloj, nigruloj) unuflanke kaj aliflanke la politikistoj de la 'malnovaj partioj', kiuj ŝajne forgesis sian klientaron. Kion vidis la popolo en la televido? Ne kiel antaŭ dek, dek kvin, dudek jaroj politikistoj, kartludante en ĉemizo kun ordinaraj homoj, ne ŝtatestron kiel Franz Jonas, veturante per tramo al sia rezidejo, ne parlamentanoj, marŝantaj kun ili sur la strato. Ne, ili vidis kancelierojn kaj ministrojn, venintajn rekte el la ĉefetaĝoj de grandaj firmaoj, vestitajn en elegantaj kostumoj kaj portantajn valizetojn. Ili aŭdis, ke partiestro diris: "Kiu havas viziojn, tiu iru al kuracisto." Ili vidis tiujn, kiuj pro preteksta ŝparado forprenas de ili la postenojn, ilin 'reprezenti'. Ankaŭ la sekvo de tio estas konata.

Haider, uzurpinte la Liberecan Partion, kuris de venko al venko. La relativan plimulton, kvankam ŝrumpantan, gardis la (denove) Socialdemokrata Partio, sed bezonis partneron por formi registaron. Kun Haider, la 'diablo', oni ne povis koalicii, do restis nur la (burĝa) Popolpartio – ankaŭ ŝrumpanta. La lasta baloto restigis la Popolpartion kiel laŭgrande tria, post la Socialdemokrata kaj la Libereca Partio. Viktor Klima, estro de la socialdemokratoj, provis formi denove koalician registaron kaj intertraktis kun la Popolpartio. Sed ties estro, Wolfgang Schüssel, ne intencas agi laŭ tiu plano. Li kaŝe intertraktis kun Haider kaj defiis la socialdemokratojn per iom pli akraj kaj neakcepteblaj kondiĉoj. La rezulto estis registaro, kies estro venis el la triegranda partio kun la tolero de Haider, kvankam tiu retiriĝis je sia estreco, sed ne vere.

Kio okazis? Evidentiĝis la vera valoro de la fanfaronado de Haider. Ankaŭ la nova registaro ne povas sorĉi. Jes, Aŭstrio havas nulan deficiton, almenaŭ en la jaro 2001, sed je kiu prezo? La imposta ŝarĝo estas unu el la plej grandaj en la Eŭropa Unio kaj ekde la militfino ni ne havis tiom da senlaboruloj. La plej grandajn ŝtatajn aŭ kvazaŭŝtatajn entreprenojn la registaro forvendis al eksterlando por sanigi la buĝeton. La laboristo subite vekiĝis el bela sonĝo: ankaŭ la 'nova' laborpartio trompis ilin. Rezultiĝis perdoj por la libereculoj en regionaj balotoj.

Nun ni devove estas je la komenco de tiu ĉi artikolo. Ĉu la unusola solvo por la fuŝita situacio estas la fondo de tute nova laborista partio? Mi pensas ke ne. La ideologia bazo de la ekzistantaj partioj estas taŭga kaj la partioj disponas pri sufice multaj homoj, kiuj ankoraŭ scias kiel paroli kun kaj agi por la popolo, sed tamen – aŭ ĝuste tial – kapablas transpreni respondecon. Oni ne konfuzu ŝtaton kun entrepreno, sed lasu tiujn labori, kiuj pozitive konsideras la vorton: "La ŝtato estas ni ĉiuj!"

La TTT-paĝoj de *LEA/G*:
**http://home.arcor.de/gmickle/leag/index.html**

La 16-an de novembro 2001 la germana socialisma ĵurnalo *Neues Deutschland* petis respondojn al la demando "Per naciaj ŝtatoj kontraŭ tutmondiĝo?" de tri konataj personoj. Estis inter ili el Italio Marco Berlinguer, filo de la eksa komunista gvidanto Enrico Berlinguer, kaj André Brie, membro de Eŭropa Parlamento por PDS. Lia respondo respegulis la tradician socialdemokratan pensmanieron, kiun li intencas fiksi ankaŭ en la nova programo de PDS. La tutmondiĝo, la politiko de EU estas kritikindaj en la detaloj, en la realigo kaj en siaj rezultoj, sed entute ne estas profunda alternativo al la vojo de la EU krei superŝtaton kaj al la tutmondiĝo laŭ konata modelo. Kontraste Maria Mies, renoma reprezentantino de la ekofeminismo, profesorino pri sociologio en Köln kaj aŭtorino de diversaj libroj pri la triamondaj, ekologiaj kaj virinaj temoj, skizis pli radikalan alternativon.

# Loka ekonomio anstataŭ forta ŝtato

**de Maria Mies**

La demando pri la nacia ŝtato en la tutmondiĝanta ekonomio estas tipe germana fenomeno. Ĝi dominis la diskutojn dum la ATTAC-kongreso fine de oktobro en Berlino. Oskar Lafontaine, socialdemokrato kaj eksa federacia ministro pri financoj, opiniis, ke la regadon de la ekonomio devas regajni la ŝtato kaj la politiko, ke ne necesas plia mal-reglamentado, sed re-reglamentado, precipe cele al la kontrolo de la sovaĝiĝinta financkapitalo per la Tobin-imposto.

Wolf-Dieter Narr, profesoro de la Libera Universitato de Berlino, replikis, ke ĉi tiuj proponoj estas naivaj kaj ignoras la fakton, ke la nacia ŝtato ekestis en intima simbiozo kun la kapitalismo. La socialdemokrataj provoj bridi kaj humanigi la kapitalismon iĝis absurdaj pro la novliberala tutmondiĝo. La provo revivigi ilin estas naiva kaj nepre fiaskonta. Nun postulata estas ne pli da ŝtato kaj re-reglamentado, sed memorganizo de la civitanoj kaj defendo de bazaj demokratiaj principoj.

Kvankam mi tendencas al la starpunkto de Narr, mi havas principajn, ne nur taktikajn rezervojn kontraŭ la starigita demando kiel tia. Malĝusta estas la premiso, ke la tutmondiĝo abolis aŭ subfosis la nacian ŝtaton. La vero estas, ke la novliberala, de grandaj konzernoj stirata tutmondiĝo ĉie sur la Tero estis trapuŝita de naciaj ŝtatoj. En la ŝtatoj de la suda hemisfero tio okazis sub la premo de la Monda Banko kaj de la Internacia Monfonduso (IMF). En la okcidento ĉiuj ŝtatoj, sendepende ĉu regataj de konservativuloj aŭ socialdemokratoj, libervole transproprigis sian nacian ekonomion al superŝtataj institucioj kiel la Eŭropa Unio aŭ Monda Komerca Organizo (WTO). La naciaj ŝtatoj ne estas do viktimoj, sed agantoj.

Krome, la novliberalismo plu urĝe bezonas la ŝtaton en la tempo de krizo por gardi la interesojn de la grandaj konzernoj kaj por samtempe elimini ĉiun protektismon, kiu favorus la propran loĝantaron. Due, la ŝtato devas prizorgi la estigon de favora investoklimato por enlandaj kaj eksterlandaj investantoj. Kaj trie, estas tiucele ekskludata la nacia politiko de sekureco (armeo, polico) el la novliberala programo. La ŝtato retenas nelimigitan subpreman povon.

Aktuale ni spertas, kiel gravaj estas naciaj ŝtatoj, ne sole por ekflamigi la "malŝtatigitan" militon kontraŭ la terorismo" ĉie sur la terglobo por la interesoj de la "Tutmondaj Ludantoj" (Global Players) kaj de la ilin protektanta superpotenco Usono, sed ankaŭ por porti ĉi tiun militon en la koron de la propraj landoj. Aktuale, la demokratiaj fundamentoj estas detruataj ne nur de la tutmondiĝanta ekonomio kiel tia. Nun estas la tasko de la politiko krei la totale observantan ŝtaton. Gravas rekoni, ke la tutmondiĝinta, "senŝtatigita" milito estas la necesa sekvo de la laŭdire senŝtatigita, tutmondiĝinta ekonomio. Mi kreis la sloganon: De la licenco predi al la licenco mortigi. Necesas la nacia ŝtato por asigni ambaŭ licencojn.

La serĉo je kaj la realigo de alternativoj okazas hodiaŭ en la internaciaj protestmovadoj kontraŭ la konzernstirata tutmondiĝo. En tiu ĉi "tutmondiĝo de malsupre" ekzistas multaj imagoj pri tio, kiel devus aspekti "alternativa ekonomio kaj socio", en kiu ne universale regas kiel centraj valoroj la strebo al profito, konkurenco de ĉiuj kontraŭ ĉiuj kaj la transformo de ĉiuj aĵoj en komercajn varojn. Antaŭ ĉio, la homoj deziras regajni la regadon super siaj senperaj vivkondiĉoj. Ili ne deziras, ke estu decidata pri ilia ekzistograva vivantaŭzorgo en la direktoraj etaĝoj de la transnaciaj kompanioj, de la Monda Banko, la Monda Komerca Organizo aŭ la Internacia Monfonduso.

Tial sekvas unue, ke la necesa transformo ne komenciĝos supre, de la politiko, sed malsupre, per la transformo de la ekonomio. Regado de la propraj vivkondiĉoj eblas nur en mallarĝaj ekonomiaj regionoj. Kaj nur, se la ekonomio tie funkcias laŭ aliaj ol la tradiciaj patriarkiaj-kapitalismaj principoj. Ĉi tiuj principoj estas antaŭ ĉio la ekonomio en superrigardeblaj komunumaj strukturoj, defendo kaj reakiro de la komunuma proprieto, kunlaborado kaj reciprokeco anstataŭ univerala konkurado, kontentigaj, sensuperregaj rilatoj (inter virinoj kaj viroj, homo kaj naturo, urbo kaj kamparo, diversaj kulturoj), diverseco anstataŭ monokulturo, loka mastrumado de resursoj.

Tia loknivela ekonomio estas la premiso, por ke ni ekhavu alian politikon, eĉ alian, pli rektan demokration. Ĝi estas krome la antaŭkondiĉo de nova internaciismo, ne bazita sur ekspluatado kaj kolonialismo. Nur kiu estas ankrita sur la loka nivelo, povas estas vera internaciisto.

**[Maria Mies, *Neues Deutschland* de 2001-11-16, paĝo 19]**

**Rimarko de Roland Schnell (tradukinto):**

**Mi pensas, ke la vizio de Maria Mies estas pli konforma al la idealoj de la Esperanto-Movado. Anstataŭ klini la genuojn kaj leki la botojn de la tutmondiĝantaj supernaciaj organizoj, inkluzive de la Eŭropa Unio, ĝi partoprenu en la realigado de regiona ekonomio kaj kontribuu en la tutmonda interŝanĝo de spertoj.**

**Graskraft GbR**
**Rudolfstr. 13**
**D-10245 Berlin**

La *Maldekstra Forumo Berlino* en la reto, i.a. kun tekstoj de flugfolioj kaj informiloj:
http://home.arcor.de/gmickle/mfb/index.html

# Recenzo

**Zlatko Tišljar: *Eŭropa ideologio*.** Inter-kulturo, Maribor 1998, 68 paĝoj,
ISBN 961-6075-19-5

Ĉi tiu libro estas grandparte identa kun la artikolo «Eŭropa ideologio», kiu aperis en *Sennacieca Revuo* n-ro 127 (1999). Mi trovis la jenajn diferencojn:

- Ĉ. 11 de la libro, «Naciaj dogmoj kiel psikologia fonto de kontraŭstaroj al eŭropa identeco» mankis en *SR*.
- La lasta alineo de ĉ. 12, «Valorigoj de niaj apartenoj» same mankas en *SR*. Ĝi parolas pri la «intensa edukado, por konvinki homojn», ke kaj la «nacia identeco» kaj la «supernacia identeco», t.e. la eŭropa, gravas por ili».

### Plurtavola naciismo laŭ Tišljar

Zlatko Tišljar promocias en sia libro «ideologion», atribuante al tiu vorto pli ol kutime pozitivan konotacion. Laŭ li, la «eŭropa ideologio» ne nur akcelos la integriĝon de Eŭropo, sed eĉ savos ĝin de malglora sorto: **«Sen komuna idearo, sen eŭropa patriotismo, Eŭropo disfalos.»** [p. 36]

La eŭropa ideologio estas laŭ lia konvinko tre ennoviga teorio. **«...mi trovis redifinojn, kiuj helpis al mi konstrui kompletan kaj konsekvencan teorion, en kiu la nocioj ne estas kontraŭdiraj.»** [p. 65]

Mi nomas ĉi tiun koncepton «plurtavola naciismo». Kvankam detale ellaborita nova naciisma koncepto estas unikaĵo en Esperantujo, ĉi tiu soklas sur la nepra premiso de plurtavola identismo, ofta ĉe esperantistoj kaj unu el nemultaj originalaj ismoj, kiuj ĝermis el la verda humo de tiu virtuala lando – simile kiel la homaranismo de Zamenhof kaj la sennaciismo de Lanti. Jen unu ebla difino de «plurtavola naciismo»:

***Plurtavola naciismo** = naciismo direktita al pluraj objektoj, kiuj estas diversampleksaj kaj samcentraj etnajkulturaj unuoj; respondanta al federacia politika ordo kaj premisanta plurtavolan etnokulturan identecon de la individuo, ĉe kiu ĉiu identectavolo respondas al unu el la niveloj de la federacia sistemo.*

La federacia politika ordo kaj la subsidiareco estas por T. strukturaj trajtoj ankaŭ de la kultura ordo. **«La ĉefa principo, surbaze de kiu Eŭropa Unio povas fariĝi forta ŝtato kaj tamen absolute garantii kaj defendi la rajtojn de la popoloj je siaj identecoj, estas la principo de subsidiareco.»** [p. 30] **«Tiun politikan principon oni devus apliki ankaŭ al la rajtoj je identecoj kaj lingvoj.»** [p. 31]

Identeckonstituaj estas por T. la politikaj niveloj eŭropa, nacia kaj lokaregiona, sed la eŭropa dominas. **«Grandaj religioj kaj grandaj ŝtatoj havas ŝancon pli stabile kaj longdaŭre evolui kaj havi pli longdaŭrajn periodojn de morala stabileco, de ideologia kredindeco. Kompreneble, se la ŝtato aŭ religio sukcesis evoluigi tutŝtatan aŭ tut*religian identecon kiel ĉefan identecon de la* apartenantoj.»** [p. 13]

Skemeca plurtavola identeco rolas en la konceptoj de multaj esperantistoj. Ankaŭ ĉe T.: **«Teritoriaj identecoj de ĉiu eŭropano estas nur lia regiona, ŝtatnacia kaj eŭropa. Tial ĉiu devas lerni nur tri lingvojn, sian regionan dialekton (aŭ minoritatan lingvon, se li estas minoritatano) por komuniki kaj havi identecon en sia regiono, ŝtatnacian lingvon [...], kaj eŭropan lingvon [...]»** [p. 33]

Kaj tamen, ĉi tiu tavolita naciismo estas pli malferma al individua pluridenteco sur la etna nivelo ol tiuj klasikaj naciismoj, kiuj premisas la tutvivan apartenon de individuo al iu nacia «destinkomunumo». **«...ĉiu rajtas per propra decido ŝanĝi siajn teritoriajn identecojn – sed neniu rajtas forpreni la grupan rajton je tiuj tri niveloj de identecoj.»** [p. 33-34]

Pli kongruas kun tradiciaj naciismoj la insisto pri la nacie ensociiga rolo de la ŝtata klerigsistemo. **«La edukado faras onin grupapartenanto. [...] La edukado laŭ unusama idearo pri la vivsenco, la informado per unusama informsistemo evoluigas ĉe ĉiuj en tiu socio, aron da komunaj ideoj, kiuj igas tiujn homojn kredi pri la samaj dogmoj (ŝajnaj veroj).»** [p. 15]

Kiel ruĝa fadeno tiriĝas tra la verko la ĵus vidita imago, ke ene de nacio regas ideokomuneco. **«...mi akiris du naciajn identecojn, kroatan kaj slovenan – sed ne la germanan aŭ aŭstran, ne la anglan, ne la serban aŭ bosnian, ĉar mi ne vivas en ŝtatoj kun tiuj lingvoj kaj sekve ne samopinias rilate la sencon de la vivo kaj morto kun ĉi tiuj popoloj, kvankam mi ilin povas lingve kompreni.»** [p. 34]

Laŭ T., ĉiu etnokultura-geografia unuo, kiu fundamentas tavolon de identeco, postulas specifan, por tiu unuo tipan «identeclingvon». La ideala «identeclingvo» por Eŭropo estas kompreneble Esperanto. Ĉar la **«lingvo krom komunikilo estas ankaŭ socia distingilo»** [p. 18], iu ne eŭroptipa – parolata ĉefe sur aliaj kontinentoj – lingvo kiel la angla ne povus plenumi ĉi tiun funkcion. **«...ekestas bezono pri nova identecŝtupo por ĉiu eŭropano – la eŭropa. Tiu identecŝtupo devas esti signita per eŭropa lingvo.»** [p. 32]

### Kompromiso inter du naciismoj

La scienca literaturo pri naciismo ofte distingas inter du naciismo-tipoj:

- la ***civila*** (civitana, respublika), produkto de la klerismo kaj la burĝaj (precipe franca) revolucioj, trovebla en lokoj, kie la nacio formiĝis per aglomeriĝo de diversetnaj teritorioj aŭ per migromovadoj, kaj
- la ***etna***, respondanta al la imagoj de la romantikisma filozofio, tipe renkontata en la historio de Germanio kaj orienta Eŭropo, precipe tie, kie la modernaj nacioj formiĝis per la dissplitiĝo de imperioj.

La plurtavola naciismo ebligas elegante kombini ambaŭ al unu tutaĵo. Ĉe T. Eŭropo konsistigas civilan nacion, kiu kunmetiĝas el etnaj nacioj kaj subetnoj.

Lia kompreno pri la subeŭropa nacio estas etnicisma: **«La burĝa revolucio de la 18-a jarcento postulis laŭeble grandan teritorion por evoluigi laŭeble grandan merkaton. Tio rezultis per ekesto de la nocio 'nacio', kies difino estis la jena: nacio estas ŝtato. [...] Ke nacio estas io alia, tion oni longe ne komprenis (nome la kuneco de kulturo de iu homgrupo, kiu inkluzivas lingvon, kutimojn, vivmanieron, edukadon, komunajn ideojn, ofte religion ktp)...»** [p. 52-53]

T. insistas, ke la internaj politikaj landlimoj en la EU-Eŭropo strikte kongruu kun la limoj inter la nacioj, avertante eĉ, ke ekzistas **«iluzio de la nunaj EU-gvidantoj»** voli **«malefikigi kaj iom post iom forigi la naciajn identecojn per la evoluigo de 'Eŭropo de regionoj'.»** [p. 40] Laŭ la donita priskribo, temas pri la «eŭroregionoj».

Ernest Gellner[1], tre influa esploranto de naciismo, ĝuste tiel difinas la terminon *naciismo*: kiel teorion de politika legitimigo, laŭ kiu la etnaj limoj ne rajtas malkoincidi kun la politikaj. Laŭ la naciisma principo, en legitimaj politikaj unuoj devas esti kongruo de teritorio, popolo (ofte strikte komprenata kiel etno) kaj kulturo.

Kontraste, la projektata Eŭropo de T. respondas tute al la civila imago, naskiĝinta en la burĝaj revolucioj kaj radikanta en la klerismo, tiel ke eĉ la rivala grandpotenco Usono rajtas esceptaokaze

[1] en *Nations and Nationalism*, Oxford: Basil Blackwell (1983)

pozi kiel modelo por ĝi. «**Do oni devas evoluigi eŭropan konscion, komunan idearon, kiu proponas kontentigajn respondojn al la demandoj, kial oni estu eŭropanoj, kial konstrui Eŭropan Union, pro kiu eŭropano fieros esti eŭropano kaj amos Eŭropon. Sed ne troigi – lasi sufiĉan individuan liberecon dubi pri tiuj ideoj. Sen komuna idearo, sen eŭropa patriotismo, Eŭropo disfalos. [...] Usono estas ekzemplo de bone ekvilibrigita rilato inter la komuna kredo pri amerikaneca identeco kaj individuaj pensliberecoj.**» [p. 36-37]

Sed tiu Eŭropo nepre baziĝu sur «granda ideo». «**Kiuj estas la veraj grandaj ideoj de Eŭropo, pro kiuj povus fieri ĉiuj eŭropanoj? Ŝajnas al mi, ke – krom la baza kaŭzo, kial oni klopodas kreskigi Eŭropan Union, nome certigi la pacon en Eŭropo – tio estas demokratio de diversecoj! [...] La senco de Eŭropa Unio estas montri al la homaro, ke ĉiu homo daŭre havas plurajn identecojn kaj apartenas samtempe al pluraj grupoj. Eŭropa Unio subtenas apartenon de siaj civitanoj al kiom ajn granda nombro da grupoj kaj stimulas la pluridentecon!**» [p. 37]

### Eŭropa misiismo

Por Tišljar la EU estas multe pli ol nur utila politika aranĝo. Ĝi estas por li institucio kun mondsignifa misio, kaj pro tio «**ni helpu al Eŭropa Unio plu kreski kaj fortiĝadi kun la tendenco, ke tiu nova ŝtupo de la homara historio iĝu modelo ankaŭ por aliaj.**» [p. 6] Tiu misio plenumiĝu ankaŭ per longedaŭra teritoria ekspansio, tamen bazita sur libervoleco. «**EU ne malebligu aliĝon al iu ajn najbara lando, kiu volas aliĝi, eĉ ne al tiuj, kiuj ne plu estas formale en Eŭropo!**» [p. 6] La Eŭropa Unio ja estu «**ĝermo de unuiĝo de la tuta homaro**» [p. 6]

Ke tiel glora patrujo rivalados kun la nun unuavica superpotenco, estas tute konsekvence. «**Kiam Eŭropo havos sian identeclingvon, kiun konos ĉiuj 400 milionoj da eŭropanoj, internet-uzantoj devos ĝin uzi sammulte aŭ eĉ pli ol la anglan. Kiu tiam postrestos?**» [p. 39]

Kiel ĉiuj ĝisnunaj naciismoj, ankaŭ ĉi tiu instrumentigos la lernejon por muldi la nacianojn. «**Por la supernacia identeco, kia la eŭropa, estas necese investi multe pli da energio per tiusenca multflanka edukado, por evoluigi ĝin kaj plenigi ĉies koron per amo por la eŭropa patrujo.**» [p. 49]

### Klasneŭtrala mondrigardo

Sen diri ĝin eksplicite, Tišljar kiel multaj esperantistaj aŭtoroj traktas etnajn problemojn kvazaŭ ĉefkontraŭdiron de la socio. Tiu cirkonstanco ebligas al ili optimisme premisi, ke la plej multaj kontraŭdiroj de la mondo, ĉar etnaj, estas solveblaj per interakordiĝo. «**Ŝajnas, ke en la monda historio io revolucia okazas, io inversas ĝian kondutmanieron kaj movas la grandan historian radon al direkto, en kiu oni solvas la sociajn konfliktojn per komunikado kaj per bona volo.**» [p. 5]

Tamen, perforto povas okazi pro la sintrudemo de *enmigrantoj*, kiuj insidas kontraŭ la indiĝena kulturo de la lokoj, al kiuj ili translokiĝas: «**Regiona identeco estas nepra bezono de ĉiuj homoj, ĉar per ĝi ili defendas sian regionan hejmon kontraŭ eventualaj malnormalaĵoj, kiam tro multaj aliregionanoj alloĝiĝas kaj klopodas perforte ŝanĝi la regionan kulturon, trudi la sian.**» [p. 31] Ni vidas ĉi tie la spuron de la etnoplurisma koncepto, ke etnoj havas ne nur «rajton esti diferencaj», sed eĉ «devon» je tio. Evidentas, ke la «malnormalaĵoj», pri kiuj T. parolas, estas la efikoj de tiu kultura interasimiliĝo, kiu okazas, kiam diversetnaj homoj loĝas sur la sama teritorio!

Krome, oni devas pacience kaj amikece alparoli la burĝaron, inokuli al ĝi la fidon, ke ankaŭ en la eŭropa patrujo ĝi restos la reganta klaso, dum la ĝis nun dominataj klasoj restos tie, kie ili ŝajne



devas – sube. «**Necesos sekve nekredeble granda streĉo de ĉiuj eŭropaj fortoj, kiuj komprenos ĉi tiun eŭropan celon, iom post iom malfortigi la psikologian barieron en la nunaj naciaj elitoj de la eŭropaj ŝtatoj, forigi ilian neracian timon, ke per la eŭropa identeco ili perdos sian potencon super sia popolo.**» [p. 44; mankas en la versio de *SR*]

### Spekulativa aŭgurado

La 13a ĉapitro titolita *Eŭropa manifesto* traktas programecan dokumenton prezentitan al la SAT-kongreso en Maribor en 1995. Ĝi evidentigas, ke T. perceptas la danĝeron de la etna naciismo, io, kio malpli klare konturiĝas en la ceteraj, pli poste verkitaj partoj de la libro. Estas notinde, ke li parolas ĉi tie pri la «**ĉiam pli ekstrema naciismo kaj ŝovinismo, moderne nomita etnopurismo**» [p. 50] kaj atakas ĝian «**malhumanisman ideologion, per kiu en unuopaj ŝtatoj povas avantaĝe vivi nur unu nacio aŭ unu religio**» [p. 50-51]. Li situigas la «purismon» unuavice en la malriĉaj, precipe la postkomunismaj landoj, sed parolas pri la danĝero, ke «**infektiĝos partoj de la demokratia bloko, speciale de la Eŭropa Unio per la purisma viruso.**» [p. 52] El ĉi tiu aferstato li derivas la neceson fondi «**movadon, kiu batalos por eŭropa konscio, por eŭropa identeco kiel primara identeco**» [p. 54]

Vere timiga estonteco atendas Eŭropon, se ĝi ne adoptos la receptaron de la anoj de «eŭropa konscio». La perspektivo de Eŭropo sen la «identeclingvo» estas katastrofa: «**Baze de trudita neneŭtrala angla lingvo kreskos nova imperio, en kiu ĉiuj neanglaj denaskuloj sentos malkontenton kaj post kelkaj jardekoj tia Eŭropo disfalos eksplode...**» [p. 55]

Simile tenebraj estas la atendoj por la mondo kiel tuto en la unua duono de la 21a jarcento: «**komence estos militoj inter la purismaj landoj mem, sed kelkaj el ili komencos endanĝerigi rekte la okcidentajn demokratiojn. Rekreskos la stato de malvarma milito inter la demokratia bloko, kaj la purisma bloko...**» [p. 51]

### Trodesegnita kontraŭstarpunkto

Kiel multaj naciismoj, ankaŭ ĉi tiu plurtavola naciismo avidas esti io alia ol naciismo. T. opinias eĉ, ke ĉi tiu idearo revoluciigas la ĝisnunan sciencon. Li parolas ĝeneralige pri «**...la ĝisnuna sociologio kaj lingvistiko, kiuj esence servas al la naciisma koncepto de la nuntempaj naciaj ŝtatoj.**» [p. 7]

T. bildigas la hodiaŭan naciisman realon tre draste, tiel ke lia propra naciismo-koncepto flanke de la pajlofiguro de la laŭdire nun aktuala «naciismo» aspektas milda. Laŭ tiu bildigo, «**...ĉiu ŝtato klopodas eduke persvadi ĉiujn siajn gejunulojn en la baza deviga lernsistemo, ke la koncerna ŝtato havas apartajn valorojn, ke ĝi pro multaj aspektoj estas la preferinda loko por la homa vivo, ke ĝiaj diversaj valoroj estas la plej bonaj, ke la vivsenco de tiuj junaj homoj estas kontribui al la fortigo de tiu ŝtato kaj ĝia longdaŭreco, kaj se ĝi tion postulas, doni ankaŭ sian vivon por ĝi. Al tiu eduka celaro aliĝas ankaŭ la religia eduko, kiu instruas, ke la ĉefa religio de la koncerna ŝtato estas la nura ĝusta kaj vera, ke kredi nur al tiu tipo de dogmo garantias postmortajn premiojn.**» [p. 42; mankas en la *SR*-versio] La ĉi tie referata naciismo bazita sur «**senkritika amo al la patrujo**» [p. 42; mankas en *SR*] aspektas kiel tiu de aŭtoritatismaj ŝtatoj en tempo de milito.

T. agnoskas la problemon, kiun la etna naciismo prezentas. «**La nova (malnova) ideologio, kiu helpas ilin [la malriĉajn landojn] en tio estas la ĉiam pli ekstrema naciismo kaj ŝovinismo, moderne nomita etnopurismo.**» [p. 50] Bedaŭrinde, li ne atakas la fundamentajn premisojn de la etna naciismo, precipe la de li mem konfesatan identeco-doktrinon, sed provas «malsovaĝigi» ĝin, integrante ĝin

en pli kompleksan tuton – kiel unu tavolon de la konstrukto de plurtavola naciismo, kontraŭefikatan de plia tavolo, la civila kaj tuteŭropa.

### Faktaj malĝustaĵoj

Kelkaj malĝustaj faktaj asertoj aperas, kie ili servas argumentajn bezonojn.

Ĉu tiu ĉi ĝeneraligo pri la sociologio ĝustas? «**Nepras profunde analizi kaj starigi bazon por nova sociologio. La ĝisnuna sociologio servis al la ĝisnuna konflikthistoria socio stariginte antaŭjuĝajn dogmojn necesajn por identeco de ŝtatoj...**» [p. 7]

La inflacia moderna aplikado de la nocio «identeco» atribueblas interalie al ĝiaj radikoj ĝuste en la individua psikologio, scienca fako ne suspektata pro reakcieco. Ĝia uzado kongruas kun la psikologia orientiĝo de teorioj, kiuj situigas la akiron de etneco en la primara ensociigo, dum ili malemfazas la pli frue elstarigitan biologian-genetikan heredadon, kiu en pli malnovaj naciismoj facile ligiĝis kun rasismo. La transiro de la «sango»-metaforo al la metaforo de la «patrina lakto» estas karakteriza. T., nekonscia pri la idehistoria evoluo de la nocio «identeco», komprenas la aferon alie: «**Ŝajne, ke ne multaj komprenas, ke ne ekzistas individua identeco. Identeco signifas ion identan, neŝanĝeblan, konstantan. Individuo havas nenion konstantan.**» [p. 14]

Ne fakta eraro, sed pritakso ne facile prikonsentebla estas tiu, ke tutmonda lingvo nur tial ne jam aperis, ĉar lingvo devas esti socia distingilo. Eraraj estas la eldiroj pri Usono. Tio okazas verŝajne pro la aŭtora deziro akcenti la malsamecon inter la usona fandpoto kaj la alstrebata Eŭropo de etnoregionoj. «**Ĝi [Usono] efektive ne subtenas grupajn naciajn identecojn, sed nur la tutnacian usonan, eĉ religioj ne estas tutŝtate egalrajtaj – ja la ŝtata religio estas kristanismo.**» [p. 37] La vero estas alia. La evoluo de sintenoj pri partikularaj identecoj ŝanĝiĝas ekde la 70aj jaroj, kiam procezo de etna-rasa memkonsciiĝo komenciĝis ĉe multaj grupoj kaj multaj aliĝis al la modo «serĉi siajn radikojn». La evoluo de sociaj sintenoj do paralelis tiun, kiu okazis en multaj partoj de Eŭropo.

T. kreas ŝajnon de ekzakteco rilate etnajn aferojn per aserto de la mezurebleco de kelkaj lingvaj fenomenoj. Dum la klasikaj etnistoj aplikas ekkonojn de la kompara lingvistiko por «pruvi» aŭ «malpruvi» la ekziston de etnoj, T. uzas alian mezuron, la proporciojn de diversaj lingvoj en la uzado de individuo: «**Ĝian [de lingvo] identecan, emocian valoron ni povas mezuri per tempouzo de unuopaj lingvoj: kiom da procentoj da nia paroltempo ni parolas unu aŭ alian lingvon. La utilecan, komunikan valoron ni mezuras per ekonomia, merkata kriterio: kioman teritorion kovras iu lingvo.**» [p. 46] Li priskribas tre homogenan socion de mirinde samkutimaj homoj, kiam li eldiras la jenon: «**Ĉiu unuopulo ja vivas plimalpli 95% aŭ pli de sia tempo en sia urbo, en sia regiono kaj parolas 95-procente en sia loka dialekto...**» [p. 46]

### Afinecoj kun la Nova Dekstrularo

La plurtavola naciismo de T. integras en si formon de regionismo, pli specife de etna federalismo, kiu oftas en etnismaj politikaj konceptoj, ekz. ĉe la skolo fondita de Guy Héraud. Ĝuste tiuj konceptoj facile integriĝis ankaŭ en t.n. «novdekstraj» politikaj konceptoj. Kaj ili nun populariĝas ĉe dekstraj popolistoj de partioj kiel la itala («padia») Lega Nord kaj la aŭstria FPÖ.

Du eldiroj en la libro memorigas pri tipaj ideoj de la «Nova Dekstrularo», troveblaj i.a. ĉe Alain de Benoist, fondinto kaj ĉefa ideologo de la novdekstra pensfabriko GRECE. Unue, ke «**...ne estas ebla tutmonda identeco**» [p. 18], ideo, kiu



pretersilentas la fakton, ke ne etnokulture bazita individua identeco kompreneble eblas kaj ekzistas, kaj ke unu grava politika identeco ĉe multaj homoj estas ĝuste la internaciisma, universalisma, la sennaciisma aŭ alia simila.

«**Ĝi [Usono] adoras la individuan liberecon, ne la liberecon de grupoj esti diferencaj. Eŭropo devus evoluigi sian identecon je tiu koncepto: kompreni la demokratecon kiel absolutan liberecon de grupoj evoluigi aŭ teni siajn diversajn subidentecojn...**» [p. 38] La «rajto de grupoj esti diferencaj» estas unu el la centraj sloganoj de la novdekstruloj, kiuj kolektiĝas en la franca skolo ĉirkaŭ de Benoist. Tiu principo per si mem ne malbonas. Sed la novdekstruloj sisteme aplikas ĝin ne universale, sed al certaj (etne difinitaj) grupoj kaj iliaj diferencoj. Kiam eblas, ili radikaligas la formulon al «devo» je diferencado.

Preskaŭ certe, T. ne konscie enkondukas novdekstrajn ideojn en la esperantistan medion, sed ĉerpas el la tie jam enkondukitaj novdekstraj ideoj, kiuj pro la influo de homoj kiel Héraud, Chiti-Batelli kaj Janton jam cirkulas, kaj pluprilaboras ilin kune kun siaj personaj spertoj.

### La praktikaj konsekvencoj

Unu agadpropono de la aŭtoro estis «**organizi internacian movadon en eŭropaj landoj por konsciigadi eŭropanojn pri la neceso esti antaŭ ĉio eŭropano. Realigi tiun celon per Asocio por Eŭropa Konscio, kiu aktivos kadre de lokaj societoj por eŭropa konscio per ĉiaspecaj formoj de klerigado.**» [p. 56] En la komenco de 1996 efektive fondiĝis tiu Asocio en Maribor, kaj laŭ eldiro de la aŭtoro farita en 1999 ĝi havis membrojn en 13 landoj. Pli da detaloj pri la interna vivo de la Asocio mi ne scias.

Dum la finaj tagoj de la Universala Kongreso en Zagrebo (2001-07-27 kaj 28) okazis seminario «Eŭropa lingvo – utopio aŭ neceso?», ankaŭ en Zagrebo[2]. Partoprenis esperantistoj kaj neesperantistoj. Kunorganizantoj estis la Asocio por Eŭropa Konscio, Maribor, la Societo por Eŭropa Konscio, Zagreb, kaj la Internacia Akademio por lingvaj rajtoj, Bruselo. Tiu lastan reprezentis ĝia prezidanto, Yvo Peeters, disĉiplo de la konata etnisto Guy Héraud kaj kiel tiu, novdekstrulo. Li regule kontribuas al *Junge Freiheit*, plej grava organo de tiu tendenco en Germanio. Alia partoprenanto estis Andrea Chiti-Batelli, konata en la Esperanto-movado pro siaj verkoj dediĉitaj al la tezo, ke la enkonduko de Esperanto povus «savi» etnajn lingvojn kaj etnajn kulturojn kontraŭ la pereo kaŭzota de la «voranta» angla lingvo – Esperanto mem laŭdire ne kapablas «vori». En la politika areno de Italio li agadas kiel advokato de federalismo kaj etnismo. En 2000 li referis ĉe seminario dediĉita al Guy Héraud, kiun organizis la dekstrapopolisma (kaj foje rasisma) Lega Nord.

En intervjuo ĉe Radio Polonia, T. aparte notis la gravan, eĉ instigantan rolon de la neesperantistoj dum la seminario. Kvankam estus troigo vidi en la «plurtavola naciismo» de T. produkton de novdekstrismo, novdekstruloj evidente vidas en ĝi kluzon, tra kiu ili povas efike vastigi sian influon en la esperantista medio.

Gary Mickle

[2] vidu la antaŭanoncon en *Sennaciulo*, 2001 junio

Forpasis en sia 68-a jaro sekve de neatendita malsano nia kamarado Ivo PEYRAUT la prezidanto de la Plenum-Komitato de S A T



FUNEBRAJ SCIIGOJ

Mortis en Wannweil la 23-an de decembro 2001, 73-jara, nia malnova kaj fidela membro

Fredo BÖHRINGER

La asocio kondolencas al lia edzino Lisel kaj al la filino Ursula

Ni ricevis la malgajigan sciigon, ke neatendite mortis en Eschborn la 21-an de februaro 2002

Manfred FÜHRER

Li estis fidela kaj tre aktiva membro de nia asocio ek de la unua horo. Dum kelkaj jaroj li gvidis LEA/G sukcese per konstanta engaĝiĝo.

Niaj pensoj iras al lia edzino Consuelo kaj la familio.

## Nova stacidomo

**En lasta julio estis inaŭgurita en Rondonopolis, Brazilo, nova kaj moderna aŭtobusa stacidomo. Rondonopolis estas urbo situanta apud ŝosea kunfluejo, kiu ligas sudon kaj nordon de Brazilo. Tra tiu stacidomo pasos 7 000 000 da pasaĝeroj jare.**

**Nia Esperanto-grupo proponis al ties administrantoj, ke la stacidomaj ŝildoj havu ankaŭ Esperantan tekston. Ili emas akcepti la proponon, kondiĉe ke ni elmontru la vivecon, utilecon kaj gravecon de Esperanto.**

Karlo Perejra / Ilson P.dos Santos
Rondonopolis MT – Brazilo

***>Fonto: Inter ni - Antananarico – Malagasa Respubliko (revuo_inter_n@yahoogroupes.fr)***

***Red.: Ni ekspedas regule ekzempleron de MAGAZINO al André Grossmann, Baldersheim (Elsass) por la grupo en Malagasio (Madagaskar) kaj ricevas le eldonoj n de INTER NI.***



## *< CI – vi >*

### Pri la uzo de tiu pronomo

**Kvankam la granda plimulto de la esperantofonoj uzas la pronomon < vi > anstataŭ < ci >, kiam ili alparolas ununuran personon inter pluraj, tia faro riskas krei miskomprenon, se la kunteksto ne estas sufiĉe klara, lasante supozi, ke ili alparolas ĉiujn.**



**Tamen, la pronomo < ci > estas Zamenhofa (Fundamento de Esperanto, paĝo 149). Pro diversaj influaj kialoj (lingvaj, bonmanieraj), Zamenhof rezignis ĝin uzi kaj tiel donis la sekvendan lingvan uzmanieron. En la lingvo genie kreita de la mastro, ĝi estas la nura neracia punkto.**

**En Francio, en la SAT-AMIKARA medio, precipe ĉe la liberecanoj, kvankam ne tute ĝenerale, estas kutimo uzi la ciumadon. Mi mem konsideras, ke ĝi estas logika kaj uzas ĝin kiam mi alparolas ununuran kamarad(in)on, kompan(in)on el tiu medio. Male, rilate ne francojn aŭ alimediajn esperantistojn mi uzas < vi > por respekti ilian supozitan kutimon.**

**Rimarko, ekster la esperantofona medio, ĉe la Naturamikoj en Francio, oni ĝenerale uzas la fratan ciumadon . *Ĉu same en Germanio?***

**Gilbert Lebec, Parizo**

### Die persönlichen Fürwörter

## *ci – vi*

**Wird nur eine Person angesprochen, bedeutet *vi* - *du.* Die Höflichkeitsform im Deutschen ist *Sie*; auch dafür verwendet *das* Esperanto *vi.* Wendet man sich an mehrere Personen mit *ihr*, so ist wiederum *vi* zuständig.**

**Mit der Anrede *vi* für eine Einzelperson riskiert man u.U. ein Mißverständnis, wenn weitere Personen dabei sind, die man aber nicht ansprechen will.**

**Beispiel: *vi estas* kann also besagen *du bist, ihr seid, Sie sind.***

**Der Autor des Esperanto, Dr. L.L.Zamenhof hat für das *vi* - *du* ein persönliches Fürwort, das *ci* geschaffen. Aufgrund von sprachlichen Einflüssen und auch um gute Manieren nicht zu verletzen, hat der Autor schließlich auf die allgemeine Verwendung dieses Fürwortes verzichtet.**

**Dessen ungeachtet wird *ci* unter guten Freunden für *vi – du* benutzt. Zum Beispiel ist es unter SAT – Mitgliedern üblich, mit diesem persönlichen Fürwort den/die *kamarad(in)o* anzusprechen. Meistens wird die Möglichkeit, mittels *ci* Vertrauen zu schaffen, ausser Acht gelassen. Immer richtig ist natürlich das *vi*, allein deswegen, weil man etwa einen *ĝis dato* noch nicht bekannten Esperantisten ansprechen möchte; zumal *vi* ja auch *Sie* bedeutet.**

***En Germanio oni preferas < vi >.***

**Stephan**

## APERNOTOJ/IMPRESSUM


Eldonanto/Herausgeber:
Libera Esperanto-Asocio
por germanlingvaj regionoj
*Freier Esperanto-Bund*
*für deutschsprachige Gebiete*
Redakcio/Redaktion:
Renchener Str.47, DE-77704 Oberkirch
Tel: (0)7802 – 90 336
Fakso: *(post antaûa signalo)*
Fax: *(nach vorherigem Anläuten)*
Nro: (0)7802 – 90 336

Redaktoroj: *A.F.Stephan (respondeca)*
*Hans Rodewig (gramatika kontrolo)*
*Gary Mickle (interreta eldono)*
*Ret-adrs/E-mail: gmickle@nexgo,de*
*Gottfried G. Hofmann (formado)*
*Reinhold Kammler (Vieno, ASLE-tekstoj)*


Aûtoroj responsas mem pri la enhavo de siaj artikoloj, bildoj , ktp. La redakcio rajtas mallongigi, aliigi aû rifuzi tekstojn, bildojn k.a.

Redaktofino: 30 tagoj antaû la apero de la informilo; ĝi aperas en marto, junio, septembro kaj decembro kondiĉe ke estas ebla.

Autoren sind selbst verantwortlich für Textinhalte, Bilder u.a. Die Redaktion behält sich das Recht vor, Texte zu kürzen, zu ändern oder abzulehnen.

Redaktionsschluß: 30 Tage vor Erscheinen des INFO-Dienstes. MAGAZINO erscheint jeweils im März, Juni, September und Dezember, vorbehaltlich der Möglichkeit.

*Abonprezo/Bezugspreis: 8 Euro jare (nova fikso eblas). La membrokotizo (8 Euro) entenas la liveradon de la informilo.*

*LEA/G-Konto: Proskovec, Jiri, Dortmund*
*n° 9168 – 434*
*Postbank Essen (BLZ 360 100 43)*
*(La konto servas ankaû por pagi la SAT-kotizojn!)*


*Represo de tekstoj k.a. el la informilo MAGAZINO estas permesata.*
**Bv. mencii la fonton!**


**Mitgliedschaft im Freien Esperanto-Bund kostet jährlich NUR 8 Euro .Inkl.Lieferung des INFO-Dienstes MAGAZINO und sonstige Dienste (z.B.Begrüssungsgeschenk)**

## Bonvenon al la Jarkunveno de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio

**Sabate la 4-an de Majo 2002**
**en la domo Sandhamnsgatan 10**
**Gärdet – Eniro 8 domo 10**
**INFOJ: Pelle Persson**
**Svartviksweg 14 SE-12352 Farsta**

**Der LEA/G-Vorstand bespricht die Ausgaben für Aktivitäten im Jahre 2002 und stellt fest, daß der Kasseninhalt notleidend ist!**



**La LEA/G-Estraro priparolas la elspezojn por aktivecoj en 2002 kaj konstatas, ke la kasenhavo suferas mizeron. – Ĉu vi jam ĝiris vian kotizon 8,00 Eûro al la asocia kaso? Donacoj estas bonvenaj.**
**Konto:**
**9168-434 Proskovec, Jiri**
**Postbank Essen (BLZ 36010043)**
**Amikan dankon por via helpo!**